http://cnt-ait.info

A.I.T.

C.N.T. F.A.I.

# INFORMACION y PROPAGANDA

BOLETIN DE LA CONFEDERACION NACIONAL DEL TRABAJO Y FEDERACION ANARQUISTA IBERICA.

Dirección: Comité Regional = Via Layetana,32-34 (Fomento del Trabajo)

1a Numero Barcelono la 25-an de julio de 1936a 1a Numero

http://informabulteno.wordpress.com/

## IBERA LIGO DE ESPERANTISTAJ SENŜTATANOJ
## I.L.E.S.

En momentoj kiam la agado ne bezonas nian helpon sur la barcelonaj stra-[illegible] kaj por kontraústarigi kaj pruvi malverecon pri la fasista propagando kun la celo senmoraligi tiujn, kiuj ankoraú batalas kaj la eksterajn [illegible]atiantojn, aerjetas per militistaj mallongondoj radiostacioj, I.L.E.S. s[illegible]rigis gian sekretariejon ce oficejo por Informado kaj Propagando por re-[illegible] esperant-lingve manifestojn kiujn A.I.T. sendas al la landoj kun kiuj oni rilatigas, pri la okazintaj gloraj faktoj de la 19-a de julio de 1936-a en Hispanio, por sufoki la fasistan fimilitistajon.

Rimarkante ke, niaj servoj plenumas tiujn kiujn efektivigas A.I.T., tial ke ci tiu Organizo ne havas sufiĉajn tradukantojn por ciuj lingvoj, baldaú oni konstatos la gravecon de nia helpo al la Inform-Servo.

Dum la Revolucio de Oktobro de 1934-a jam ni tradukis la manifestojn de A.I.T. kiel en aliaj okazoj, forsendante ilin al 22 diversaj landoj kun kiuj rilatigas I.L.E.S.

Multnombra de gazetoj ni ricevis de tiuj landoj sur kiuj, siavice publikigis la manifestojn per sia propra lingvo.

En tiu fiera revolucio de la hispana proletariato, ankaú ne mankos, kaj pro tio ni estas ci tie por pli bone ol pasintaj fojoj, efike kaj rapide [tra]duki ciujn novajojn.

-=oOo=-

## MORTIGITOJ EN BARCELONO

Laú statistiko havebla al ni gis hodiaú, dum la bataltagoj en Barcelono, perdis sian vivon pli ol 550 personoj.
Proksimume 200 kontraúfasistoj estis mortigitaj dum liktado kontraú ribelantaj militistoj. En malamikaj vicoj la plejmulto el la falintoj estis devigataj soldatoj. La "sinjoracoj", malgraú ke ili trankvili eniris en kazernojn, malkurage ili forkuris kiam mortdangero alproksimigis, multaj soldatoj,kiuj estis trompitaj de la oficiraro mortis. Sed la nombro de la oficiroj estas ankoraú pli granda. Kelkaj el ili, estis mortigitaj de soldatoj mem, sed plejmulte el ili ricevis morton pro la kugloj de la laboristoj.
Eć kelkaj oficiroj, kiuj nekapablaj suferi tian propran honton havigis al si mem mortpafon.

-Oo-oOo-

http://cnt-ait.info

La Regionaj Komitatoj de C.N.T. kaj de F.A.I., publikigis, dum la merkredo, 22an., je la 5a. vespere, tri manifestojn "Tuja kaj direkta Justeco de la popolo", "Al Popolo de Katalunio" kaj "Al la Virinoj".

---

LA JURNALOJ "La Humanitat", "La Publicitat" kaj "El Diluvio", kaj prekaŭ la tuta gazetaro aperintaj en Barcelo, malpliigas (Konscie) la perforta revolucia movado de C.N.T. kaj F.A.I. Legante tiujn burĝajn jurnalojn, oni havas impreson ke la faŝistoj estis balaitaj pere de tiuj ridindaj politikistoj. Nur marksista gazeto diris ke, C.N.T. batalis kuraĝe kontraŭ la faŝistoj.

---

Dum la ribeltagoj kontraŭ la faŝistoj falis murdita la k-do. Plácido López, kiu apartenis al la gazet-komitato de la anarkista gazeto "Tierra y Libertad Li apartenis ankaŭ al la grupo "Germen".

---

Dum tago 21a. post tagmeze la faŝistoj dekuranta aŭtomobilo pafis kontraŭ la k-do Cabrerizo, kiu estis mudita.

http://informabulteno.wordpress.com/

---

Dum la sama tago ankaŭ estis murdita la k-do Fernandez. Tiu ĉi k-do. estis la administranto de la organo de la Anarkista Junularo "Ruta". Li estis tre aktive kamarado.

---

[illegible] la tago 21a. nokte, en la urbeto Villanueva y Geltrú, falis murdita la k-do Vicente. Li apartenis al la Anarkista Junularo de Barcelono; li marŝis [illegible] kun aliaj kamaradoj al la urbeto Villafranca por ataki la tieajn faŝistojn.

---

Barcelono ankoraŭ ne suferis mankon da nutraĵoj, sed se kamplaboristoj, ne plu efektivigas aŭ plimalgrandigas la sendaĵojn, baldaŭ produktiĝos malsufiĉo.
C.N.T. tre aktive zorgas pri tia danĝero; kaj tien kien ne ordenos la ĝgado de siaj provizumaj delegitoj, volas alvenigi sian voĉon por rekomendi ĉiujn kamparanojn ne toleru ke, pro malkonfidemo aŭ forlaso, absolute malpraviĝas velkos kaj putriĝos sur la tero fruktoj kaj verdlegomoj tre necesaj al la urbkamaradoj kaj ili estos disvendataj kaj enspezataj laŭ perfektareguleco.

http://cnt-ait.info

---

La Sindikato de Nutraĵoj, instalis magazenojn en la Avenuo Layetana, ĝi provizumas la tutan urbon Barcelono. Ĉe la pordoj de magazenoj estas vicoj tre [illegible]digitaj, kiuj atendas por ricevi nutraĵojn. Antaŭ la magazenoj, estas la aŭtomobiloj kiuj portas nutraĵojn al la popularaj kuirejoj kiuj estas instalitaj ĉe la Sindikatoj, Ateneoj kaj eks-preĝejoj. Eĉ la Polico, por rajti manĝi, bezonas permeson de la Sindikato. Sen la bileto de la Sindikato neniu povas alpreni manĝaĵon el la magazenoj. La Sindikatoj el la Regionoj pere de siaj Sindikatoj zorgas porti nutraĵojn al Barcelono. Nune ĉiuj manĝas en la urbo.

---

Ni havis okazon vidi tiel mirigan spektaklon en Unika Vestaĵa Sindikato (C.N.T.) dum disdonado da vestaĵoj, ke nia koro estis gajtuŝita konstatante alifoje ke, popolo tre povas sin organizi sen burĝularo, multaj personoj kiuj malkonfidis pri la laboristaro kaj estis dirantaj ke e ni ne estus povantaj nin komprenigi sen aŭtoritato kaj sen kapitalismo, nuntempe ili mem vidas kontraŭon, tio estas: nian sukceson.

http://informabulteno.wordpress.com/

---

[illegible]landanoj kiuj pasis iliajn libertempojn en nia lando venas al Sindikato kaj sin oferas senkondiĉe. Alvenas francaj, polaj, rusaj, svedaj, ir[illegible] kaj amerikaj. Inter ili ni trovas profesorojn, kuracistojn, inĝenierojn, ĵurnalistojn kaj aliprofesiulojn. Unuj venas ĉar ili delonge simpatias al [illegible] liberecanaj ideoj; aliaj ĉar ili konsideras ke, ĉiumomente la plej [illegible] frapo por faŝismo estis donata de F.A.I. kaj C.N.T.

http://cnt-ait.info

La angla kolonio kiu somerpasigis, en Sitges, kaj kiu hieraŭ eliris en ĝian landon, estis surprizata de la granda kuraĝo, firmeco kaj organiza talento de la laborista sindikatoj.

- Mi estus kredanta ke la laboristaj sindikatoj ne estus kapablaj organizi tiel bone la vivordon se mi ne estus vidinta tion- deklaris eksterlanda teknikulo.

.-=oOo=-.

## ONI PREPARAS MARŜADON AL ZARAGOZO.

La proletaj kontraŭfaŝistaj milicioj ĵus finaranĝis la starigon de karavanoj destinataj al Zaragozo, kaj doni la finfinajn batojn kontraŭ la faŝistan fokuson. En ĉiuj Sindikatoj estas memvoluloj kiuj rekrutiĝas en la kadroj de la laboristoj por kontraŭbatali faŝismon. La tutan tagon en la fabrikejo de "Hispano-Suiza" la laboristoj kirasadas aŭtomobilojn por iri Zaragozon.

.-=oOo=-.

## LA AGADO DE LA VIRINOJ.

Dum la mirindaj okazintaĵoj kiujn ni travivas, la agado de la virinoj estis, por multaj, la plej surprizinda: ili luktis ĉe la barikadoj, ili alkuris kien ajn oni bezonis ilin kaj ankaŭ ili iris Zaragozon. kune kun la kontraŭfaŝistaj milicianoj, lumigitaj la okuloj pro la entuziasmo.

http://informabulteno.wordpress.com/

La nuna horo pasos, tion plena de longtempa senco, kaj restos el ĝi en prefera loko tiom kiom faris kaj faras la virino. Ili kuraĝigis la luktantojn per sia persona ĉeesto kaj sia fervoro. Vidi ilin en la luktaj lokoj estis tre agrabla por la mirado kiu serĉis la malamikon, kvankam certe ne videbla. Malamiko kiu volis malaperigi ĉiujn nin en malnobla reĝimo. La kamaradinoj gajnis kaj ni ankaŭ, por eterne, Liberecon. Kontraŭ tiuj malamikoj,ankoraŭ ne tute malaperigitaj, sed pri certa venkado ni ne dubas. Kun ribelitaj popolamasoj kiel nuntempe okazigis la hispanoj, helpataj de la virinoj, kiel ĝi estis kaj estas dum ĉiumomento, kaj en ĉiaj misioj, sen timo al nenia dangero, ne ekzistas nevidebla malamiko.

Oni venkis en Barcelono kaj en aliaj lokoj kaj oni venkos en la tuta lando; kaj tiam estos la momento por entrepreni la vojon al la Sociordo de ni ĉiam celita. En kiu estas rezervita al la virinoj la loko kiun ili meritas; loko kiun ili mem gajnis per sia agado pri kiu oni parolos dum multe da tempo, kiam oni povos skribi kun ia ripozo, nuntempe neeble, pri la miriga momento kiun ni sorte travivis.

http://cnt-ait.info

.-=oOo=-.

## LA BATALANTOJ MARŜAS KARAVANE AL ZARAGOZO.

Je la 10a. horo matene, 24an de julio, marŝis la dua kontraŭfaŝista karavano al Zaragozo. La ĉefurbo de Aragono estas ankoraŭ sub la regado de la faŝistmilitistoj. Entute la faŝista armeo, en tiu ĉi urbo, estas plena divizio, tio estas: du regimentoj de infanterio, unu de artilerio kaj alia de inĝenieroj.

La regimento de inĝenieroj delongtempe estas konsiderita kiel faŝista regimento. Al tiu ĉi armeo oni devas aldoni ankaŭ, multajn militistajn korpusojn kaj faŝistajn bandojn, kiuj helpas la menciitajn diviziojn.

La faŝista milicio sumas entute ses aŭ sep-mil bonarmitajn homojn.

Zaragozo estas unu el la plej gravaj strategiaj lokoj en Hispanio. Tion bone scias la faŝistoj kaj pro tio ili fortiĝis en tiu regiono.

La plimulto el la laboristoj el Zaragozo estas organizita en C.N.T. sed ilia forto ne sufiĉas por kontraŭbatali la faŝistajn fortojn.

La komitato de la kontraŭfaŝistaj milicianoj kiu gvidas la armitajn fortojn en Katalunio decidis foririgi la armitajn laboristajn karavanojn por ataki la faŝistojn. La Komitato decidis forsendi sesmil milicianojn, sed la entuziasmo estis tiel granda ke nombro de la volontuloj por iri Zaragozon, en ĉi karavano atingis la nombron da 10 mil. Aliaj miloj restis ĉe Barcelono atendante, senpacience, la momenton por helpi ilin ĉu estus necesa.

Kune kun la batalantaj kamaradoj marŝis ankaŭ multaj virinoj kiuj estis viresttitaj kaj eĉ surportantaj multajn ŝtalkestojn.

http://informabulteno.wordpress.com/

http://cnt-ait.info

Unuavice iras la kirasveturiloj de C.N.T. kaj F.A.I. gvidante la [illegible] -do. B. Durruti. Ĉiuj la anaksindikalistoj kaj anarkistoj portis ruĝ-nig[illegible] [illegible]jn rubandojn.
Post la karavano de C.N.T. kaj F.A.I. sekvis kelkaj grupoj da marksis[illegible] oj. La tuta barcelona popolo adiaŭis entuziasme la forirantajn batalantojn ĉar ĝi estas plene konvinkita ke ili liberigos la zaragozan popolon kaj t[illegible] un de la tuta Hispanio je faŝismo.

.-xoOox=-.

PUBLIKIGAĴOJ DE C.N.T. FRANC- KAJ GERMAN-LINGVE.

La vendredo vespere, la 24an. de la kuranta monato, aperis du gazetoj eldo-nitaj de Inform- kaj Propagand-Oficejo de C.N.T. kaj F.A.I. franc- kaj ger-man-lingve.
Unu el ili estas nomata: "Service d'Information de la C.N.T. et F.A.I." kaj [illegible] alia " Informations dienst der C.N.T. und F.A.I.".
Per ĉi bultenoj oni informas al franca kaj germana popolo pri movado de n[illegible] organizo kaj ankaŭ pri la revoluciaj okazintaĵoj de C.N.T.- kaj F.A.I.-lu[illegible]-tantoj.

http://informabulteno.wordpress.com/

.-=oOo=-.

[illegible]RIST-REVOLUCIA FILMO.

[illegible]ilmaj laboristoj kiuj laboras direktitaj de la Inform- kaj Propagand-[illegible] jo filmis, krom aliajn okazintaĵojn, la kontraŭfaŝistajn milicianarojn marŝadis al Zaragozo. Post nelonge la tutmonda laboristaro estos adm[illegible] [illegible]j filmon pri ĉiaj revoluciaj okazintaĵoj travivitaj en Hispanjo.

.=oOo=-.

http://cnt-ait.info



http://informabulteno.wordpress.com/